N-o 6. 1934. 4. XII.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: Dr. ST. KAMARYT Dr. A. PITLÍK*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

*Dr. A. Pitlík:*

## Antaŭ dudek jaroj.

(Mondmilita rememoro priesperanta.)

Depost julio de tiu ĉi jaro oni ofte legas en ĵurnaloj artikolojn, titolitajn „Antaŭ dudek jaroj", en kiuj oni rememorigas al si la eksplodon de *la mondmilito,* ĝiajn kaŭzojn kaj sekvojn, la mondmiliton, *kiu abrupte tranĉis la agadon de multaj internaciaj movadoj, kiu penis ankaŭ ĉesigi tiun de la esperantistaro.*

Tri mil sepcent esperantistoj aliĝis al la X-a Universala kongreso en Parizo, kies okazigo estis modele preparita. Alveninte Parizon la 1-an de aŭgusto 1914, la fremdaj esperantistoj vidis ekscititajn popolamasojn kaj ĝeneralan mobilizon. Ĉiu penis rapide reveni hejmen, sed ne ĉiuj sukcesis. Kelkaj eksterlandaj esperantistoj estis internitaj en civilkaptitejoj, la ceteraj fortostreĉe revenis hejmen, multaj por tuj foriri al la batalkampoj.

D-ro Zamenhof, haltigita en Köln am Rhein, rapidis al rusa landlimo; trovinte ĝin fermita, li reveturis Berlinon kaj devis entrepreni longan kaj lacigan vojaĝon tra Svedujo—Finnlando—Peterburgo por fine reatingi la hejmon en Varsovio. *Sovaĝa hombuĉado ekregis, la kanonado eksonis anstataŭ la esperantista himno!*

La eksplodo de la mondmilito trafis Universalan Esperanto-Asocion, tiutempan centron de la tutmonda esperantistaro, en la plej bona stato. La mondmilito minacis nun ĉion ĉi detrui. Sed danke al la preteco kaj spertoj de la gvidantoj de UEA tiel ne okazis. UEA, malfermita en neŭtrala Svislando, rapide adaptis sin al la milito kaj al novaj bezonoj: Ĝi organizas servon por transsendo de familiaj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj kaj peradas montranssendon, kio kaŭzas, ke aro da helpantoj kaj bonvolaj gesamideanoj en militantaj landoj ofte devis suferi malagrablaĵojn kaj eĉ enkarcerigon. UEA intervenas ankaŭ helpe de la Ruĝa kruco internacia, sidanta en Ĝenevo, por rapide sciiĝi pri soldatoj malaperintaj, sed *UEA ankaŭ ne forgesas siajn „filojn", esperantistajn militkaptitojn, kiujn ĝi provizadas ne sole per esperantaĵoj, sed ankaŭ per nutraĵoj.* La amplekson de la plenumita laboro flanke de UEA dokumentas 14.516 poŝtaĵoj, kiuj en la unuaj 5 militmonatoj trairis la Centran oficejon de UEA en Ĝenevo kaj la manojn de la lokaj gesamideanoj, kiuj ofereme helpadis.

*La propra agado de UEA nature per eksplodo de la mondmilito haltis, sed la sukceso de la menciitaj servoj rekreskigis la tutmondan intereson pri esperanto kaj ĝia aplikado.* En la januara numero de „Esperanto" 1915 Hektoro Hodler eldiras kredodeklaron de la tiutempaj veraj esperantistoj: „Flanke de niaj simpatioj," diras Hodler, „ni havas devojn, kiujn al ni trudas nia esperantisteco, devon konservi prudenton eĉ meze de la premigaj influoj de la popolamasoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero. Kiam oni post la milito sur la ruinoj konstruos ‚novan internacian domon', ni *esperantistoj estu la embrio de la elitoj".*

La kroniko montris, ke eĉ post la eksplodo de la mondmilito la esperantista movado ne mortis. En aliaj kontinentoj, en landoj, kiuj ne partoprenis la militon, ĝi daŭris ageme, en San Francisko en aŭgusto 1915 eĉ okazis la XI. Universala kongreso de espo! En kelkaj landoj aperis eĉ peresperantaj militaj propagandiloj, pravigantaj la nacian vidpunkton. La militkaptitejoj en la militantaj landoj — pro multaj kursoj, gvidataj tie de la militkaptitaj samideanoj — fariĝas eĉ fruktodona ĝermejo de esperanto kaj ĝia interna ideo. Estas memkompreneble, ke *la milito ne favoris la esperantistan movadon precipe en la militantaj landoj.* Ĝia eksplodo haltigis tie la organizan agadon kaj societan vivon de la esperantistaj kluboj, kies viraj membroj plejparte foriris al la batalkampoj.

(Daŭrigo en venonta n-ro.)

# TRAKT (Teatro- kaj Radio-aktoroj).



La legantoj de Bulteno de ĈAE kaj la aŭskultintoj de multaj esperantlingvaj disaŭdigoj de ĉeĥoslovakaj radiostacioj jam bone konas ilin. TRAKT estas artista sekcio de la Kulturklubo en Brno kaj ĝiaj anoj estas nur artistoj: kantistoj, verkistoj, aktoroj de Landa teatro ktp. Jen la nomoj de la geaktoroj laŭ la bildo. Sidantaj: f-ino A. Novotná, s-ro K. Urbánek, f-inoj Zd. Švabíková kaj Zd. Tvrdá, starantaj: A. Klimeš, Vl. Leraus, K. Höger, K. Mátl, A. Fiala, J. V. Šamla, dro Fr. Kožík, reĝisoro J. Bezdíček. Esperanton ili lernis en kurso aranĝita pasintjare de Radio-journal Brno kaj gvidata de s-ino Marie Strejčková. La nivelo de la esperantlingvaj disaŭdigoj de la ĉeĥoslovakaj sendostacioj fariĝis pro tio tre alta kaj la dissendoj tre ŝatataj.

jvš.

## Kroniko Esperantista en ĈSR.


**Ekspozicio.** La „Deutsche Hochschulgewerkschaft“ en Praha okazigis 12.—13-an de majo en Praha II., Jungmanova 29, ekspozicion „De la Alpoj ĝis la dezerto“, en kiu estis ankaŭ Esperanto-stando kun materialo disponigita de la GEL-grupo. La stando vekis intereson precipe ĉe la universitata studentaro.

**XII-a internacia tendaro de Skolta Esperantista Ligo** en Kordíky apud Banská Bystrica 16-an—30-an de julio 1934 bone sukcesis. Apudan ekzerc-tendaron de grupo de Slovakaj Katolikaj Skoltoj el Zvolen partoprenis 22 skoltoj. En la knabina tendaro ĉe Tajov vivis 35 skoltinoj. Sume tendaris en kadro de la SEL-tendaro 142 geskoltoj. Malferma ceremonio okazis la 17-an. Matenon estis katolika meso kun esperantlingva prediko kaj liturgiaj kantoj laikaj en esperanto. Posttagmezon estis la tendaro oficiale malfermita de la ĉefkomandanto kaj reprezentanto de SEL frato S. E. Mann el Anglujo. Paroladon faris frato Paŭlo Balkanyi el Budapest. Ĝin sekvis alparoloj de SKS-estro kaj komandanto de la tendaro, frato A. Miškovič (tradukita esperanten de frato A. M. Macek), distriktestro Adolf Pštros, ĝen. vikario Msgr. Mesík-Vajda. Sekvis tagoj de gaja skolt-maniera vivo. La bela regiono tre kontentigis ĉiujn, tial la ekskursoj estis tre allogaj. La 22-an estis apud la tendaro „etnografia tago“. La 23.—25-an estis granda ekskurso, precipe por la la fremdlandanoj plejparte senpage, tra vidindaj lokoj de Slovakujo. La 26-an estis an la tendaro oficiala kunveno de SEL prezidita de S. E. Mann, dum kiu parolis Balkanyi (Hungarujo), Stan. Lešinger (Praha), Ign. Vidal i Guitart (Barcelona), Pěcháček (Polujo), L. Bacsa (Jugoslavujo), Št. Sninčák (Košice), A. Macek (Bratislava). Salutleteroj venis el 16 landoj. En longa diskutado oni plendis pro malgranda nombro de abonantoj de la Skolta Bulteno, oni postulis malgrandigon de abonpago, plendis pro malforteco de la naciaj SEL-komitatoj. La 28-an estis ĝenerala kunveno de Centro de slovakaj katolikaj skoltoj (Ustredie slovenských katolíckych skautov), kies Esperanto-fako, gvidata de s-o A. M. Macek, organizis la tendaron. La kunveno decidis inviti per sia Esperanto-fako ĉiujn naciajn skoltajn asociojn, ke ili ĉiujare tendaru en subtatra regiono en pluraj negrandaj tendaroj, kaj promesis al ĉiuj sekvintoj de sia invito plej grandan helpon. La 29-an estis parada marŝo tra Banská Bystrica. Kanoniko dro Körper el Bratislava faris solenan paroladon slovake kaj esperantlingve. Ŝtataj kaj ekleziaj aŭtoritatuloj kaj reprezentantoj de la ĉeestantaj nacioj salutis la ĉeestantaron. — La organizintoj de la tendaro povas esti kontentaj kun la sukceso, eĉ

se ili prave atendis pli grandan nombron de skoltoj el fremdlando. Estis promesita ĉeesto el 15 landoj. La organizantoj sciis akiri apogon de diversaj oficialaj rondoj. La slovaklingva invitilo havas jenan liston de „protektoroj“: Marian Bláha, episkopo en Banská Bystrica, Dr. Anton Eltschkner, konsekra episkopo en Praha, prez. de Ligo de katolikaj espistoj en ĈSR, Hans Jakob, direktoro de UEA, Stan. Kamaryt, prez. de ĈAE, Rob. Kreuz, direktoro de UEA, Dr. Vlad. Krno, urbestro de Bratislava. Distriktestraro de Banská Bystrica, Urbestraro en Banská Bystrica, Jozef Orságh, prezidanto de la Lando Slovaka, Dr. E. Privat, redaktoro de „Esperanto“, E. Stettler, prezidanto de UEA, Anton B. Svojsík, prof., regna estro de Skolta Asocio JSS en ĈSR, Jozef Šnejdárek, generalo, estro de la Landa komandejo en Bratislava, Dr. B. Tomsa, rektoro de la Universitato en Bratislava, Fr. Zelanka, ano de la landestraro en Praha. Kaj ankoraŭ pli longan liston de „honora komitato“ kun Dr. A. Pitlík, O. Sklenčka kaj pluraj aŭtoritatuloj ne-esperantistaj. Komando de la tendaro estis: Ĉefkomandanto Sidney Edgar Mann, komandanto Alojz Miškevič, I-a adjutanto Alojz M. Macek, II-a adjutanto Št. Sninčák, administranto Inĝ. Lad. Krčméry, pres-raportanto Dro Ján Balko. Publikaj aŭtoritatoj helpis la tutan entreprenon krom per diversmanieraj faciligoj ankaŭ per monaj subvencioj: Ministerio fremdlanda 5000 Kč, ministerio komerca 5000 Kč, Landa ofico en Bratislava 3000 Kč. La Centro da slovakaj katolikaj skoltoj meritas nian dankon pro sindono, kiun ĝi dediĉis al tiu ĉi granda entrepreno, same kiom ĝi meritas, ke ĝia invito al fremdlandaj skoltoj estu akceptita de multaj. Ĉiuj, kiuj intencas veni en sekvontaj jaroj, estu certaj, ke ni ĉiuj faros niajn eblojn por agrabligi ilian restadon en nia lando.

**Esperantista libertempejo en Lázně Bělohrad** okazis ĉi jare jam la trian fojon en monatoj julio—aŭgusto. Ekonomia krizo tutmonda malhelpas pograndan alvenon de eksterlandanoj, sed tamen venis kelkaj (po unu el landoj: Svedlando, Nederlando, Polujo, Italujo, Palestino). El Ĉeĥoslovakio venis 40 partoprenantoj. Ĉiuj estis tute kontentaj pri la aranĝo. Okazis kelkaj brilaj kunvenoj (dum unu s-ro generalo Rambousek el České Budějovice bele rakontis pri siaj vivspertoj). Ankaŭ ĉi jare libertempejo faris bonan propagandon en la urbo, pruvante tiamaniere la signifon de esperanto. Lokaj samideanoj organizis ankaŭ la aranĝon de kurso de ĉeĥa lingvo por germanaj instruistinoj.

**Regiona konferenco en Lázně Bělohrad** okazis la 11.—12-an de aŭgusto 1934 kaj partoprenis ĝin 42 personoj el orienta, suda kaj norda Bohemio (Praha, Ml. Boleslav, Turnov, Litoměřice, Petrovice u Police n. Met., Veselí n. L., Jičín, Bukovina, Kutná Hora, Česká Kamenice, Lázně Bělohrad, sume 11 lokoj. La konferenco estis senprograma, nur amuze-libertempa, sed tamen dum unuhora kun-




veno okazis tre interesa debato pri aranĝo de Universala kongreso en nia lando. El ĝi rezultis la instigo al niaj centraj organizoj prepari la medion por ebligi baldaŭan okazigon de mondkongreso en Ĉeĥoslovakio. Oni konstatis, ke la registaroj invitantaj la kongreson, bone komprenas ne nur propagandan, sed ankaŭ ekonomian signifon de kongresoj kaj ke de la XIII-a en Praha pasis jam 13 jaroj.

**Grandstila propagando dum foiro en Liberec,** 18—24-an de aŭgusto, estis organizita de GEL, kies prez. prof. inĝ. Scholze estas ano de la foira komitato. Apud la stacidomo estis kvinlingva tabulo ankaŭ kun esperanta teksto „Informoj por eksterlandanoj“. Loĝeja ofico havis indikon ankaŭ en es-po. Ĉe la foira oficejo estas surskribo „Esperanto-Abteilung—Esp-o Fako“. La foira katalogo enhavas diversloke anoncon: „La moderna komercisto uzu Esperanton! Informojn donas Esperanto-Fako de la Foiro de Reichenberg!“ En la stacidoma strato estis sur hotelo „Imperial“ ekspozicieto „Varbado por la fremdultrafiko per Esperanto“. Sur la ĉefa placo estis triangula kolono kun germanlingva okulfrapa teksto: „La ŝlosilo por la plej granda simpligado en negoco kaj trafiko kun eksterlando estas Esperanto“. En la foira tereno staris sur tre centre situita loko naturgranda semaforo kun facile legeblaj vortoj: „Bahn frei für Esperanto!“ Antaŭ la ĉefaj haloj estis prismo-formaj afiŝejoj kun germanlingvaj surskriboj: „Por Via popolo kaj lando uzu la lingvon gepatran, por la mondtrafiko Esperanton!“ En la diversaj foiraj haloj pendis afiŝo (6x1 m) kun sume kvar tekstoj rekomendantaj esperanton. En la ekspozieto „La komercisto“ en kadro

de la Foiro estis speciala stando montranta diagrammaniere, ke por atingi 19 eŭropajn landojn per iliaj naciaj lingvoj 19 tradukaĵoj estas bezonaj, dume per esperanto sufiĉas unusola. — La Libereca foiro uzas esperanton por siaj celoj jam dum 15 jaroj. Ĝi meritas pro tio la saman gratulon, kian GEL-prezidanto inĝ. Scholze, kiu estas ĝia tre sperta kaj diligenta konsilanto pri tiu fako.

**Regiona labora konferenco en Kolín** kunvenigis 70 esperantistojn el 21 lokoj (Bakov n. J., Boconowice ve Sl., Bratislava, Česká Lípa, Dvůr Králové n. L., Holovousy, Hradec Králové [5], Jablonec n. N., Jablonné n. O., Kolín [19], Košice, Kutná Hora, Lubná u Lit., Mladá Boleslav [2], Pardubice [3], Praha [24], Praskačka, Prostějov, Přelouč, Těpeře u Sem.). Sabaton, 29-an de septembro estis amika kunveno senprograma, amuza. Dimanĉon la 30-an antaŭtagmeze estis *solena ĝenerala kunveno* de la E-ista Klubo en Kolín, sub prezido de Jan Janda. Li skizis la historion de la movado en Kolín kaj rememorigis mortintan fondinton de la klubo, s-on Josef Černý. Estis reprezentitaj: Distrikta klerigа korporacio (s-ro Dr. R. Feder), Rotari-klubo (s-ro Dr. Řeřovský), Ĉeĥoslovaka-jugoslava ligo (s-ro Saska), Urba muzeo (direktoro Jos. Štolba). Salutleterojn sendis societoj Kolínaj: Klubo de ĉsl. turistoj, Klubo filatelista, Juna generacio de la mezklasa partio negocista, Sport-klubo Čechie, Unueca ligo de privataj dungitoj. La kunvenon salutis Dr. Kamaryt (ĈAE), Dr. Pitlík (Ĉsl. E-Instituto), Dr. Pontz (GEL), J. Šustr (Klubo en Praha), MUDr. Marek (Klubo Ml. Boleslav), A. Horáček (K. Kutná Hora), A. Michalová (K. Pardubice). Salutleteroj venis de kluboj en L. Bělohrad, Bratislava, Jaroměř, Č. Budějovice, MUDr. Šíl, Ulrich, Schäfer, Slaný, A. J. Schiller, Šupichová, Murath, Veverka. — Post la kluba knnveno sekvis la *regiona konferenco* prezidata de Kamaryt. Dum la vigla agado oni raportis pri ĉiuj aktualaĵoj de la movado. Meritas esti enskribitaj precipe pri: Radio: La konferenco decidas esprimi kontentecon pri daŭra uzado de esp-o en disaŭdigado kaj danki al direkcio de Radio-journal kaj al stacio en Brno. — Skoltoj. S-ro konsilisto Friedrich raportas pri spontanea intereso de skoltoj en Košice por kurso; ĝi estas eble sekvo de la tendaro en Kordíky kaj de nia daŭra atento pri la skoltismo. — Stacidomaj tabuloj ricevas laŭ spertoj de konsilisto Friedrich aprobon de pluraj fremduloj, kiuj ilin vidis. Ginz kaj pluraj aliaj parolintoj insistis por plua mendado. — Libroservo estas akceptata kun rimarkinda simpatio; la membroj daŭre uzu la eblecon akiri facile la librojn. Prof. Kožený rekomendas, ke L. S. akceptu aliĝon al AELA.— Gazetara servo; s-ro Staněk kunportis la kolekton de eltranĉaĵoj el la kuranta jaro. La dikeco de la kolekto kaj la tre plaĉa aranĝo elvokis sincerajn laŭdojn. — En publikaj legejoj kaj kafejoj estu elmetataj de la lokaj kluboj niaj gazetoj (laŭ propono de dro Marek). — Unuecigo enlanda. Estis donitaj detalaj informoj pri la nuna stato de la laboroj. Dr. Pontz skizis la vidmanieron de GEL-anoj. Konsilisto Friedrich kaj dro Kamaryt raportis pri la ĝis nun faritaj laboroj de la Porstatuta komisiono, kies kunsido estis kunvokita posttagmezon. — Nova situacio de UEA. Partoprenintoj de la kongreso s-roj Dr. Fousek, Heikenwälder, Pytloun raportis pri siaj impresoj el la kongresa agado. Ili ĉiuj havis impreson, ke la „popolo“ tute ne havis malkonfidon al la ĝistiamaj gvidantoj de UEA, sed ke la iniciato al ŝanĝo venis de parto de gvidaj personoj en la movado. El detala diskuto de la nova situacio, kiun partoprenis krom la nomitaj precipe s-roj dr. Pitlík, dr. Pontz, Sklenčka, Ginz, dr. Kamaryt, rezultis esprimo de konvinko kunlabori ankaŭ en la nova formo de internacia organizo sub kondiĉo, ke ĝi dece respektos niajn viadmanierojn. — Posttagmeze promenis la konferencanoj tra la urbo. Ili vizitis la ĉefajn vidindaĵojn, precipe preĝejon de sankta Bartolomeo, Muzeon (dum gvido de direktoro s-ro Štolba), sinagogon (dum gvido de Dr. R. Feder).

**Ĉeĥoslovaka esperanta instituto** en Praha aranĝis merkredon la 24-an de oktobro 1934 en salonego de Národní kavárna societan kunvenon, kies programo enhavis la jenon: Esperantista himno „La espero“, Malferma saluto de prez. de ĈEI Dr. A. Pitlík, „Patra lingvo“ kaj Esperanto (poemo el la versaro „La vagabondo kantas“ de Julio Baghy), „Vivu esperanto“ (pianludita marŝo pri signalo esperantista de A. Menzel), „Antaŭ 20 jaroj“ (mondmilita rememoro priesperanta), pianludita serenado de Fr. Schubert, „Papersaketo da sukeraĵoj“ (novelo de Hasse Zetterström, trad. esp. akademiano P. Nylén), Uzo de esperanto sur rusaj poŝtaĵoj, Mondekspozicio en Chicago 1933—34 (filmo 400 futojn longa, akompanata de indiana, usonnegra kaj cowboya muziko sur gramofondiskoj). La aranĝon kaj programon partoprenis afable gesamideanoj: Echtnerová, Hlaváčová, Kubíčková, Eckert, Ginz kaj dr. Pittík. La „Vespero“, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 100 gemembroj el ĉiuj esp. organizaĵoj en Praha, celis same kiel la aranĝotaj „Soc. kunvenoj“ (en decembro, februaro kaj aprilo) disponigi neŭtralan bazon por „societa kaj amika“ interrilatoj de esperantistaro en Praha. La venontan societan kunvenon okazigos ĈEI mardon la 11-an de decembro 1934 okaze de naskiĝtago (15. XII. 1859) de Dr-o Zamenhof en la sama ejo.

**Nova Esperanto-memorŝtono en nia lando.** La 4-an de novembro 1934 estis en Nový Bohumín solene inaŭgurita memorŝtono. Ĝi estas granda ŝtonbloko kun la stelo kaj surskribaĵo: „Per Esperanto al interfratiĝo de popoloj.“ La teksto de la devizo estas en esperanto, ĉeĥa, germana kaj pola lingvoj. La monumento staras en urba parko de Nový Bohumín. Ĝi estis starigita per sindona

kaj persista klopodado de Regiona Ligo Esperantista en Český Těšín, kiu dum pli ol du jaroj dediĉis siajn laborkapablon kaj energion al efektivigo de tiu ĉi ideo. Ĝi meritas sinceran dankon de ni ĉiuj. La sukcesa inaŭgura festo signifis por ĝiaj laborantoj vere meritItan sukceson kaj idean rekompencon.

**Regiona Ligo Esperantista** daŭrigis en j. 1934 sian agadon laŭ sia sistemo senŝanĝe. La agado konsistas el monataj kunvenoj okazantaj en diversaj lokoj de la Ostrava-regiono. Ĉar la jara kotizo estas minimuma, relative multaj esperantistoj akceptas la inviton ekskursi je fiksita dimanĉo en proksiman lokon. La kunvenoj okazis en Třinec (18. II.), Lazy (18. III.), Nový Bohumín (6. V.), monto Ĉantorio (10. VI.), monto Gírová (8. VII.), monto Jaworowy (26. VIII.), Stožek (16. IX.), monto Prašivá (7. X.), Nový Bohumín (4. XI.). La lasta estis kunigita kun inaŭguro de la memorŝtono, pri kiu ni raportas aparte. La plej granda nombro de partoprenintoj de la kunvenoj estis 90, la plej malgranda 18. La punktoj de la programoj estis krom parto amuza raportado pri aktualaĵoj de la movado, diskutoj pri nia unueciga projekto, konsiliĝoj por starigi memorŝtonon. Tiuj ĉi alportis tre rimarkindan rezulton en festo de Nový Bohumín. Pri la unueciga projekto ĉiuj koncernaj kunvenoj esprimis aprobon. Ni danke konfirmas tie ĉi tiun tre saĝan kaj utilan sintenon de RELanoj. Ilia prezidanto Krysta estas ano de la Porstatuta komisiono. Pri la agadoj kaj kunvenoj raportas kaj al la novaj invitas ciklostilitaj cirkuleroj dissendataj regule al rimarkinda nombro de adresoj. Tiu ĉi aranĝo mem havas signifon de bona propaganda faro. Krom la menciitaj tri sferoj meritas esti enskribitaj por la jaro 1934 ankoraŭ zorgo pri esp-o-disaŭdigoj el stacio Mor. Ostrava, provo aranĝi karavanon al la Stockholma kongreso, partopreno en la Viena konferenco per sia reprezentanto s-ro Poncza. Prez. de REL estes L. Krysta en Č. Těšín, sekretario prof. Jar. Hladký en Karvinná.

## Movado.

**Porstatuta komisiono.** Por ebligi personan diskuton al ĝiaj germanaj anoj kunvokis ĝia prezidanto kunvenon de la komisiono por la 29-a de septembro en Liberec-on. La invito estis dissendita la 13. IX. Kun la dato de 21. IX. venis de anoj inĝ. prof. Scholze kaj Dro Pontz informo, ke ili pro alia grava okupo ne povos partopreni la kunvenon sabaton vespere, sed ke Dro Pontz povus veni dimanĉe Kolínon. Tial la prezidanto kunvokis la komisionon Kolínon kaj la kunveno okazis 30. IX. posttagmeze je la 14-a. Ĉeestis Friedrich, Sklenčka, Kamaryt, Dro Pontz. La prezidanto-konsilisto Friedrich donis al ĉiuj ĉeestantoj kopion de ŝanĝproponoj venintaj de Krysta, Kamaryt kaj Murath. Ili koncernas detalojn facile aplikeblajn en la teksto de la statuto-projekto. La ĉeestintoj detale diskutis la eblecojn de baldaŭa fondo de la nova asocio kuniganta ĉiujn neŭtralajn esperantistojn en nia respubliko. Kiam Dro Pontz denove proklamis la opinion de la gvidantoj de GEL, ke la tempo ne estas ankoraŭ matura por tia unuiĝo, ĉar la simplaj membroj de GEL verŝajne ne konsentos kun tia unuiĝo, oni akceptis unuanime la proponon, ke en la januaran ĝeneralan kunvenon de GEL estu invititaj ankaŭ Friedrich, Kamaryt kaj Sklenčka, kiuj klarigos al la membroj de GEL sian vidpunkton koncerne la unuiĝon. Dro Pontz promesis, ke li ellaboros kun inĝ. Scholze event. ŝanĝproponojn al la nova statutprojekto kaj dissendos ilin al la komisionanoj plej malfrue 20-an de oktobro. ĈAE kaj GEL havos tiel la eblecon presigi en novembro en siaj bultenoj la finan staton de intertraktado. Ĉar Dro Pontz dissendis al la komisionanoj nur 1-an de novembro la ŝanĝojn proponatajn de GEL, kiuj estas tre ampleksaj kaj bezonas pli longan pristudon, ne estas eble informi niajn legantojn jam en tiu ĉi numero pri la fina stato. Intertempe sendis ankaŭ prof. Murath siajn rimarkojn al la lastaj proponoj de Scholze—Pontz.

**Ŝtataj ekzamenoj.** Ĉe ĉeĥoslovaka komisiono en Bratislava lasis sin ekzameni 5. XI. 1934 s-ro Julius Macho, ĉefleŭtenanto de dĕl. pluk 112 en Mukačevo kaj sukcesis tre bone.

## Esperantista vivo.

**Edziĝis** 23. VI. en Praha-Žižkov f-ino M. Zavadilová kun s-ro K. Trnka, ambaŭ membroj de Katolika klubo esperantista en Praha. Koran gratulon!

**Mortis** 1. VIII. s-ino Wildmannová, prezidantino de SOĈNE, oferema laborantino ĉe la blinduloj. Honoron al ŝia memoro!

---

### El Turnov al L. Bělohrad.

Mi petas esperantiston, kiu skribis kelkajn leterojn al s-ino K. T. en Turnov: Prenu vian leteron de la 5. X., kiun mi resendis al vi. Tie estas ankaŭ mia letero sub signo de vi mem elektita. K. T.

---

## Stacidomaj tabuloj.

Ni ricevis entuziasmajn konfirmojn pri efiko de tiuj tabuloj. Ni jam de la komenco estis konvinkitaj, ke la tabuloj ne faciligos sole la vojaĝadon de eksterlandano tra nia respubliko, sed ke ili ankaŭ eminente propagandos nian aferon ĉe la vojaĝanta publiko ĝenerale. La tabulo en la stacidomo pruvas per siaj vivaj koloroj bonan kaj daŭran marŝon de nia afero. Multaj aktivaj kluboj kaj oferemaj samideanoj komprenis tion kaj la tabuloj jam pendas en sube notitaj stacidomoj. Sed ili devas esti en centoj da stacidomoj pluaj kaj ni atendas tial novajn mendojn. Ni denove informas, ke la tabulo kun via adreso, kun fikso en la stacidomo, kiun ni mem prizorgos kaj kun unujara lupaĝo kostas 26 Kč. Por jaroj venontaj estas pagota sole lupaĝo 6 Kč jare. Postulu de ni specialan mendilon kun ĉiuj detaloj. Kiu ne repagis por la jaro 1935, bonvolu sendi 6 Kč por ĉiu tabulo al nia poŝtŝparkasa konto nro 12.371.

Kaj jen la pioniraj stacioj:

Aŝ, Bakov nad Jizerou, Bělohrad Lázně, Bor u České Lípy, Bratislava, Brno (6 tabuloj), Česká Kamenice, Česká Lípa, České Budějovice, Georgswalde, Holešov, Hradec Králové, Kežmarok, Kladno—Výhybka, Kolín, Komárno, Košice, Lenešice, Litoměřice en ambaŭ stacidomoj, Litomyšl, Lom u Mostu, Louka—Horní Litvínov, Louny, Mladá Boleslav en 3 stacidomoj, Mnichovo Hradiště, Mukačevo, Nymburk, Otrokovice, Pardubice, Písek, Plzeň (3 tab.), Police nad Metují, Poprad—Velká, Postoloprty, Praha en 6 stacidomoj, Prešov, Prostějov, Přelouč, Rumburk, Senica nad Myjavou, Staré Strašnice, Teplice — Šanov (2 tab.), Tisovec, Trnava, Trutnov, Třebechovice p. Orebem, Turčanský sv. Martin, Týniště n. Orlicí, Uherské Hradiště, Užhorod, Varnsdorf, Výtok, Zvolen, Žatec.

Ili vivu kaj vivu la sekvantoj! O. G.

# Informoj.

**Libro-Servo de ĈAE** prizorgas al vi ĉiun esperantan libron deziratan, lernolibron, vortaron, belan literaturon. Skribu al Oficejo de ĈAE, Praha XIX., Uralské nám. 447.

**Plena vortaro de Esperanto,** dua eldono pliriĉigita, aperis. Libro absolute necesa por ĉiu praktikanto de la lingvo. 512 paĝoj dense kompostitaj 145x200 mm en plentola bindo. Por 114 Kč liveras afrankite Libro-Servo de ĈAE. Sendu vian mendon per poŝta pagilo al k-to nro 12.371 Svaz čs. esperantistů, Praha.

**Angloj pri Basic-English.** Anglalingva flugfolio klariganta la vidpunkton de angloj pri ĉi tiu lingva ludaĵo. Enhavas valorajn informojn. Afrankite por 50 hal. liveras ĈAE.

**Gvidlibro tra Kolín.** Bele aranĝita libreto 16-paĝa, ilustrita kaj kun valora enhavo. Por 1 Kč afrankite ĉe ĈAE.

---

**Esperantistoj, anoncu en Bulteno!** Laŭ peto veninta de niaj membroj ni deziras la koloran kovrilon de Bulteno n-ro 1 de la jaro 1935 plenigi per adresoj aŭ malmultekostaj anoncoj de samideanoj-komercistoj. Interesiĝantoj, anoncu vin baldaŭ ĉe la administracio de la Bulteno.

---

# Lokaj informoj.

*Bakov n. Jiz.* Kurso komenciĝis 4. X.

*Banská Bystrica.* Internacia tendaro de Skolta Esperantista Ligo 16.—31. VII.

*Bratislava.* 14. X. vizitis la urbon 17 esperantistoj el Wien, gvidataj de Welward kaj Denke. Ili venis per ŝipo, estis atendataj de bratislavanoj sur kajo, fotografitaj kaj poste gviditaj tra la urbo por viziti la ĉefajn vidindaĵojn. Posttagmeze ili estis en kafejo en montara parko, kie ili tre bone amuzadis sin per babilado kaj danco. El bratislavanoj funkciis kiel ĉefaranĝanto Kiss. La gastoj vidigis sian kontentecon, restis en amuzado ĝis la lasta momento. Ili foriris per vagonaro je la 18-a. — 14. XI. komenciĝis kvinmonata kurso, lecionoj ĉiumerkrede.

*Brno.* Kurso komenciĝis 18. IX. De la 3. ĝis 10. X. en montra fenestro de librovendejo Lošťák en grava strato Veveří ekspozicio de pli ol 100 esp. libroj kun aldono de klarigaj tekstoj. En novembro simila ekspozicio en librovendejo Martinek. En ambaŭ okazoj bonega sukceso.

*Břeclav.* Regulaj konversaciaj kunvenoj de loka Esp. Klubo ĉiun unuan kaj trian mardon en monato.

*Česká Třebová.* Kunveno de esperanto-amikoj 9. IX. kun ĉeesto de 22 samideanoj lokaj, el Svitavy kaj Lubná. Parolis Vaněk kaj Hovádek. Riĉa ekspozicio 7.—14. X. en ejo de Sokol. Kurso komenciĝis 21. XI,

*České Budějovice.* Esperantista klubo La Progreso aranĝis novan kurson. Antaŭ ĝia komenco festa vespero kun ekspozicio.

*Dolní Bousov.* Kurson laŭ rekta metodo kun 68 p. gvidas depost 24. X. prof. Kožený.

*Fryštát.* En legejo de urba domo kurso por ĉiuj tri nacioj de tiu urbo.

*Hazlov.* Dua kurso por komencantoj finiĝis 10. VII. kun 7 p. Gvidis K. Stöcker el Aŝ.

*Hlubina.* Ĉe Laborista gimnasta unuiĝo gvidas kurson Chrobák, prezidanto de E. K. Mor. Ostrava.

*Hluk.* F. Omelka aranĝis paroladon pri esperanto kaj ekspozicion.

*Horní Litvínov.* Kunveno de ARE 1. X.

*Hradec Králové.* Preparita kurso de itala Ĉe-instruisto pro lia malsano ne okazos.

*Chrastava.* Ĉefkunveno de Distrikta Asocio Reichenberg de GEL okazis 27. V. Ĉeestis 29 p. el 4 lokoj. Estis prezentitaj raportoj pri la stato de movado en Chrastava, Jablonec n. N., Liberec, Rychnov u J. Provleciono de H. Fasce. Urbestro de Chrastava salutis la kunvenon. Estis reelektitaj Franz Hub el Jablonec n. N., Friedhofstr. 4., estro, d-ro J. Pontz, notaria kandidato, sekretario de la distrikto. Korespondaĵoj estu adresitaj al la prezidanto.

*Jablonec n. N.* La loka grupo de GEL „Izermontaro“ festis 21. X. sian 25-jaran fondiĝfeston. Sabate 20. X. vespere amika kunveno. Matene kunveno en bela halo de nova urbodomo dum ĉeesto de reprezentantoj el Liberec, Varnsdorf, Chrastava, Šumburk, Pulečný, Tanvald, Rychnov n. Kn., Dvůr Králové, Turnov, Mn. Hradiště, Bukovina, Těpeře kaj gastoj el Breslau, Dresden kaj Görlitz. Ĉeestis prezidanto de GEL inĝ. Scholze. Grandstila ekspozicio.

*Jaroměř.* Ekspozicio 28. IX.—10. X. en montraj fenestroj de V. Exner, esperanto-stando dum nacia festo 28.—30. IX. Trimonata kurso gvidata de A. Adam komenciĝis 1. X. Daŭre vigla laboro.

*Kolín.* 29.—30. X. kunveno de centro- kaj orientbohemaj esperantistoj kaj festo de dekjara datreveno de loka klubo. Kurso publika en ŝtata reala lernejo.

*Komárno.* Kurso komenciĝis 6. X., kiu daŭros ĝis fino de aprilo.

*Košice.* Kurso per grupo de katolikaj skoltoj komenciĝis en unua semajno oktobra kun 20 p., instruas fervojkonsilisto J. Friedrich. Aŭtuna sezono komenciĝis per parolado de Tibor Bobula pri lia vojaĝo al baltaj ŝtatoj. La klubo sendis je siaj kostoj 3 skoltojn al la Internacia tendaro en Tatroj.

*Kunovice.* Ekspozicio kaj parolado 30. IX. Malfermis direktoro de burĝa lernejo Cigánek, parolis faka instruisto Fr. Omelka el Hluk, E. Philadelphy kaj Tichoň. Kurso komenciĝis.

*Kutná Hora.* Kurso komenciĝis 1. X. Estas 25-a jaro, depost kiam oni instruas en tiu urbo esperanton.

*Lazy.* Trimonata kurso malfermita en pola lernejo, instruas ĉiudimanĉe Gabryš. La loka grupo Emo eldonas multobligitan gazeton Nia celo.

*Lázně Bělohrad.* Dum julio kaj aŭgusto III-a internacia libertempejo. Nova senpaga kurso kun 18 p. Instruas dufoje semajne f-ino Havlásková. Invito afiŝita tra la tuta urbo. Kesteto kun sciigoj informas la loĝantaron pri la novaĵoj el la movado.

*Litoměřice.* La 5. XI. parolado en hotelo Rumburk pri la kongreso stockholma. Kunvenoj ĉiun lundon en sama loko. Konstanta informejo en strato Klecanského en vendejo de f-ino J. Hellerová.

*Louny.* Loka sekcio de Československá Obchodnická Beseda aranĝas esperantan kurson gvidatan de direktoro P. Cahák. Antaŭ la kurso ekspozicio.

*Lubná apud Litomyšl.* Propaganda ekspozicio en montra fenestro de samideano Večeře. Dissenditaj flugfolioj Jeden jazyk al la loĝantaro, kun rimarkinda sukceso. Trimonata kurso komenciĝis 3. XI. kun 7 p. Ĉiusemajne 2 lecionoj.

*Luhačovice.* Pri sia vojaĝo tra eŭropaj ŝtatoj parolis estono Walter Loorits. Tradukis prof. Kl. Urban.

*Mladá Boleslav.* En loka klubo parolis K. Šolc pri sia vojaĝo tra Eŭropo, d-ro Marek pri infektaj malsanoj, Pytloun pri stockholma kongreso. Kurso komenciĝis. Danca vespero 10. XI. kun arta programo.

*Mnichovo Hradiště.* En E. klubo Verda Stelo parolis 13. IX. Fr. Pytloun el Bakov pri la kongreso en Stockholm. La 4. X. lumbilda parolado de K. Šolc pri lia bicikla vojaĝo tra Germanio, Nederlando, Belgio.

*Moravská Ostrava.* En YMCA instruis Pravoslav Bradáč. En legejo de YMCA 6 esp. gazetoj. Somere okazis regulaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon. Kurso por progresintoj gvidata de inĝ. Lad. Krajc. La EK daŭre eldonas sian Verdan Informilon.

*Nové Město na Moravě.* Nova kurso komenciĝis.

*Nové Zámky.* Per grandaj afiŝoj estas anoncataj kursoj por slovakoj kaj hungaroj. La unuan gvidas V. Bujarek kaj J. Kotoulek, la alian Becska. Kun Esperantista Rondo Amika kunlaboras la Lokomotivista grupo. La informa ŝranketo en la urbo faras bonan servon. 11. XI. propaganda vespero.

*Nový Buhumín.* 4. X. malkovro de la esperanta memorŝtono en urba parko.

*Nový Jičín.* Rondeto Kruco en stelo aranĝis kurson, gvidatan de R. Kvita.

*Nymburk.* EK aranĝis la 17. VI. en hotelo Slavia amuzan vesperon.

*Orlová.* Esp. klubo Emo kun loka klubo radioamatora aranĝas kristnaske ekspozicion.

*Olomouc.* EK aranĝas 40-horan kurson.

*Plzeň.* Somere kurso en Peklo ĉiumerkrede. Dimanĉe ekskursoj. En komuna kunveno kunvokita la 15. IX. de EK decidite aranĝi 1-an de ĉiu monato kunvenon de la esperantistoj okcidentbohemaj. Dua kunveno 6. X. Germana klubo aranĝis publikan paroladon kaj kurson por komencantoj. Ĉe Laborista societo Plzeň I. komenciĝis 2 kursoj en laborista domo Peklo post antaŭa bona preparo per afiŝoj en tuta urbo. Laborista societo Kulturo kaj Laborista societo en Plzeň-Škvrňany propagandas efike per informaj ŝranketoj pendantaj en vivaj stratoj de la urbo. Per konstanta ŝanĝado de la enhavo fariĝas tiuj ŝranketoj interesaj objektoj por la preterpasanta publiko. Amuza vespereto en laborista domo 15. XII.

*Podklášteří.* Parolado de W. Loorits el Tallinn.

*Praha.* Katolika klubo aranĝis plurajn paroladojn de L. Dandová, Št. Bálková. Kurson gvidas Dandová. Inter blinduloj regulaj kursoj dum la tuta jaro. En instituto de Klar instruas Vlasák kaj Vavrušová, germanajn blindulojn Moder. En Deyl-instituto instruas R. Kratochvílová. 3. XI. memora vespero por honori la mortintan prezidantinon de SOĈNE Wildmannová. Post multaj intervenoj permesis la ministerio al nevidantoj fari ŝtatan ekzamenon el esperanto. Polica Esperanta Rondeto aranĝis 5-an kurson, kiu komenciĝis la 5. XI. Instruas F. Řádek. La rondeto havas 50 membrojn, kiuj kunvenas ĉiulunde kaj perfektiĝas en la lingvo sub gvido de Řádek, Vaněček kaj Vlasák. En faka organo Bezpečnostní služba publikigis artikolon pri la rondeto J. Vávrovský. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto aranĝis 24. X. societan kunvenon kun bone elektita programo. Parolis d-ro Pitlík, Echtnerová kaj Ginz. Ĉiumarde en kafejo Morava kunvenas konversacia rondo gvidata de Konst. Koutek. Esperantista klubo dediĉis al nunjara Propaganda semajno specialan klopodon. En la stratoj de Praha 300 grandaj afiŝoj invitadis al kurso. Multaj centoj da flugfolioj estis dissenditaj kaj donitaj. Kvin fakaj gazetoj kaj ĉiuj gravaj ĵurnaloj alportis informojn ripete, 9 kinoteatroj projekciis inviton al lerno de esperanto kaj ankaŭ radiostacio de Praha disaŭdigis ĝin. Anoncis sin 21 p. al kurso por progresintoj; instruas Staněk kaj Klopfleisch.

*Prešov.* 26. VI. lasta kunveno antaŭ la libertempo. Urba kleriga konsilantaro aranĝas esp. kurson 9. XI. en evang. gimnazio.

*Prostějov.* Depost 2. X. kurso por komencantoj en knabina burĝa lernejo. Instruas Fr. Heikenwälder. Li gvidas ankaŭ kurson por progresintaj skoltinoj en klubejo, kiun partoprenas 10—15 p.

*Protivín.* Kun helpo de frataj kluboj en Č. Budějovice kaj Vodňany aranĝis la loka grupo grandan

esp. ekspozicion. Vizito bona. Kurson gvidas Ploss el Č. Budějovice,

*Radvanice*. Esp. klubo Nova vivo komencas 30. IX. kurson en la popola lernejo,

*Rychnov nad Kněžnou*. Amikoj de esperanto kunvenas ĉiumerkrede en gastejo na Burku.

*Slezská Ostrava*. 20. X. komenciĝis kurso, instruas St. Chaloupka.

*Sloup*. Ĉefkunveno de la „Nordbohema Esperanto-distrikto“ de GEL okazis la 17-an de junio. Partoprenis ĉ. 70 p. el 22 lokoj. Prezidis distriktestro s-o Taubmann. Krom GEL-anoj ĉeestis svedino Vera Hakansson, pluraj esperantistaj gastoj el Ĉeĥoslovakio kaj reprezentantoj de la Laborista esp-ista organizo. Estis elektita nova estraro de la distrikto. Estro: Hans Klinger, supera dogansekretario en Podmokly, Schiller-placo 846. Sekretario: Hans Roppert. Korespondo estu adresata al la estro.

*Staré Město*. Skolta grupo komencis 10. X. kvinmonatan kurson. Instruas Fr. Ullrich el Uh. Hradiště. Partoprenas 31 p.

*Stonava*. Grupa kunveno 2. VI. Vizitis ĝin ankaŭ 4 k-doj el Karvinná. 8. VII. kunveno ligita kun ekskurso en Živočice, vizito al la tiea Laborista domo, sur kiu troviĝas surskribo n u r en esperanto.

*Třebíč*. 18. VI. parolado de Loorits en burĝa lernejo. Tradukis Arnošt Schwangmeier.

*Turnov*. En ekspozicio de ŝtata lernejo juvelista estis laŭ permeso de la direktoro starigita esperantostando, aranĝita de Fr. Pytloun el Bakov. La 5. V. estis la ekspozicio vizitita de grupo da esperantistoj. En Esp. klubo parolis 18. IX. Pytloun pri la stockholma kongreso. La klubo aranĝis kurson en ŝtata reala gimnazio. Ĝin malfermis direktoro Tureček 17. X., instruas Z. Blažek el Mn. Hradiště.

*Tisovec*. Ĝen. kunveno de loka klubo. Prezidanto G. Krivoš, sekret. J. Vítek.

*Uh. Hradiště*. 6. IX. komencita kurso.

*Vítkovice*. En popolkleriga institucio Lidová škola kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Gvidas Slaný.

*Vodňany*. Ĉe fino de la kurso amuza vespero en klubejo (hotelo Mašek) kun bone elektita programo. Konversaciaj vesperoj ĉiun merkredon.

*Zábřeh n. O.* Esp. klubo Mor. Ostrava aranĝas tien ĉi kurson.

*Záluží u Mostu*. Alois Petr gvidas kurson kun 14 partoprenantoj.

*Znojmo*. Klubo de katol. esp. preparas kurson en novembro.

*Železný Brod*. 19. VI. unua leciono de Ĉe-metoda kurso gvidita de Fasce el Italio.

·*Žilina*. En kurso kun 66 p. Instruas L. Goldstein.

**Internacia ĵurnalo enkondukas Esperanton.** La semajna ĵurnalo „European Herald“ eldonata en Londono kaj ĝis nun redaktata en angla, germana, franca, hispana kaj itala lingvoj, decidis aldoni Esperanton al la lingvaro uzata. La enhavo de la ĵurnalo estas interesa por ĉiu esperantisto, kaj lingvostudantoj trovos ĝin tre utila. La esperantan sekcion oni daŭrigos nur, se montriĝos intereso flanke de la samideanoj. Okaze de forta subteno oni pligrandigos la esperantan parton. „European Herald“ estas vendata de gazetvendistoj en preskaŭ ĉiuj landoj. Tiuj, kiuj ne sukcesis ĝin aĉeti, sendu respondkuponon (poŝtan aŭ de UEA) al „European Herald“, 110 Fleet Street, London, E. C. 4. Prezo en ČSR Kč 2·—. Abonon prizorgos por niaj membroj ankaŭ ĈAE.

**VITRAJ ESPERANTO-STELOJ** — kravatpinglo Kč 1·-, kun ĉeneto sur kolo Kč 5·-. haveblaj ĉe samideano **Adolf Novotný**, vitropentristo, **Těpeře** 61, p. Železný Brod.

**SENPAGE** sendas al vi la 48-paĝan, dukoloran, ilustritan katalogon de LITERATURA MONDO la Libro-Servo de ĈAE. La katalogo enhavas inter aliaj specialan oferton pri la

**Zamenhofa tago 1934:**

**GRANDAJ PREZMALALTIGOJ**

validaj por mendoj, faritaj plej malfrue la **15-an de decembro 1934.** Post tiu dato mendoj estos plenumataj nur laŭ la malnovaj prezoj.

| | Prezoj en Kč: ordinaraj | malaltaj |
|---|---|---|
| *BAGHY: Dancu Marionetoj* | 30·— | 11·— |
| *FORGE: Mr. Tot aĉetas mil okulojn* | 35·— | 14·— |
| *FR. SZILAGYI: Trans la Fabeloceano* | 26·— | 14·— |
| *KARINTHY—TOTSCHE: Vojaĝo en Faremidon* (nur broŝ.) | 10·— | 5·— |
| *K. R. C. STURMER: El la Notlibro de Praktika Esperantisto* | 22·— | 11·— |
| *ŜALOM AŜ—IZRAEL LEJZEROVICZ: La sorĉistino el Kastilio* | 30·— | 14·— |
| *KOLOMANO KALOCSAY: Lingvo, Stilo, Formo* | 26·— | 12·— |
| *KOLOMANO KALOCSAY: Eterna Bukedo* | 79·— | 38·— |
| *GOETHE—KALOCSAY: Romaj Elegioj* | 17·— | 9·— |
| *DANTE—KALOCSAY: Infero* | 78·— | 38·— |
| *L. TOTSCHE: De Paĝo al Paĝo* | 22·— | 11·— |
| *E. AISBERG: Fine mi komprenas la radion* | 40·— | 19·— |

Ĉiuj prezoj por broŝuritaj libroj. Por binditaj libroj oni devas aldoni por ĉiu libro po Kč 7·80. Minimume mendebla kvanto la valoro de Kč 24·—. Mendojn plej malfrue ĝis 15-a de decembro akceptas Libro-Servo de ĈAE.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.